

Leterkesto 5.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-011-B-3

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-011/SRI-1990-011-B-3-Claude-GACOND-Leterkesto-V.mp3>

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Kiel ni diris en la kvar pasintaj elsendoj malfermante nian leterkeston, alvenis mesaĝoj el 36 landoj de 166 aŭskultantoj. Al tiuj skribintoj ni respondas laŭ la alfabeto ordo de ilia familia nomo.

Stanislav KAREŠ en Houče (Ĉeĥoslovakio) sendis salutojn el festotagoj omaĝe la 20-a datreveno de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1969-1989. Ni konservos tiun poŝtkarton kun speciala stampo en la arkivejo CDELI. Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio Jaroslav KARHAN en Olomouc skribis:

A.- "La 130-a naskiĝjubilao de nia Majstro devus instigi ĉiujn esperantistojn strebi celkonscie efektivigadi lian vivmision kompleksan. Do, ne nur lian verkon lingvan, sed precipe eĉ lian koncepton homaranan, por kiu lia epoko ne estis ankoraŭ matura. Sed la epoko nia maturiĝas jam por tio: la bazaj homaranaj ideoj de Zamenhof povus kaj devus esti realigitaj enkadre de la ekumena movado. Grava okazo por tio ekestos dum la "Kunvoko" en Seulo 1990, kiun preparas World Council of Churches, kies sidejo troviĝas en Ĝenevo."

Cl.- Jean-Jacques KASPARIAN en Meudon (Francio) gratulas pro la konstanta kresko de nia aŭskultantaro. Karl-Heinz KERSTING en Essen (Germanio okcidenta) ne nur skribis:

A.- "Ĉiam denove mi aŭskultas viajn prelegojn kun plezuro".

Cl.- Li ankaŭ atentigas nin, ke en la Instituto por literaturo germana kaj eksterlanda troviĝas esperanto-biblioteko. Ĝuste pri bibliotekoj okupiĝas Geoffrey KING en London. Li sekretarias por Tutmonda Esperantista Biblioteka Asocio. En la 74-a Universala Kongreso en Braĵono, la kunsido de TEBA daŭris 90 minutojn grupigante 22 personojn el 14 landoj. Tiuj ĉi opiniis, ke en la nuna stato precizaj strukturoj ne necesas. Jozefo KISS en Galyatető (Hungario) finis la pasintan jaron skribante:

A.- "Mi deziras al vi feliĉon, sanon kaj same tiel bonegajn radioprogramojn venontjare, kiajn mi aŭdis en tiu ĉi jaro."

Cl.- Helmer KOCH el Germanio orienta sendis aŭdraporton el feriado en Bulgario. Ni reciprokas la salutojn de Magda KOMIENSKA en Budzyn (Pollando). Josef KONDOR en Neuwied (Germanio okcidenta) esprimas la deziron

A.- "ke la esperanto-kontribuo ĉe Svisa Radio-Internacia estu ĉiam pli forta. La elsendotempo, kiu ne estas tre konvena por multaj, por li estas sufiĉe favora, ĉar je la 14h30 li okupiĝas pri la ordofarado en sia kuirejo. Ĝus en la elsonda tempo li estas preta kiel diligenta edzo ĉe la lavado-purigado de la manĝilaro."

Cl.- Koncerne al la elsendoj de niaj junaj kunlaborantoj Andy KÜNZLI kaj kelkfoje Pascal DUBOURG d-ro KONDOR diras:

A.- "Ambaŭ junuloj estas laŭ mia prijuĝo eminentaj posteuloj de la brile funkciantaj "olduloj".

Cl.- Michael KOOB en Dernbach (Germanio okcidenta) same laŭdas la laboron de Andy KÜNZLI:

A.- "La enhavo de la elsendo, nome la enkonduko al nova prelegserio de Andy KONZLI pri la komenco de esperanto kaj la tiama socia medio el diversaj vidpunktoj estis tre interesa. Viaj venontaj sabataj elsendoj promesas malenuan aŭskultadon kaj multklerigajn informojn pri la bazo de nia movado".

Cl.- Karel kaj Zdena KOPECKÝ en Trebechovice (Ĉeĥoslovakio) ankaŭ sendis laŭdojn:

A.- "Akceptu koran saluton de mi kaj mia edzino el libera Ĉeĥoslovakio. Aŭskultante ĉiujn viajn elsendojn kaj iliajn ripetadojn, ni konstatas, ke ĉiam en bona kvalito kaj kun kutima intereso. Bedaŭrinde ĉi-sabate mi ne povis vin aŭskulti, ĉar mi ĉeestis la kunvenon de ĈEA - organizaĵoj kaj funkciuloj de Esperantaj rondetoj en nombro de ĉirkaŭ 80 partoprenantoj en sudmoravia Straznice. Ĉefa temo estis: Esperanta agado en novaj kondiĉoj en la libera ŝtato. Nia centra komitato estas sen ŝanĝoj, ĉar ĝi estis progresema ekde la lasta ĉeĥa kongreso en Olomouc ... Ni nur koncize aldonas, ke nin ĝojigas prelegoj pri muzeoj, lastempe balotado (referendo) pri armeo, pri alteco aŭ ebleco de rapideco por aŭtistoj. Tio estas la formo de plej alta demokratio, kiun ĉe ni dum lastaj semajnoj ni tiel serĉas. Dum rapida marŝado ni devas senĉese lerni, por ke ni evitu erarojn. ... Memkompreneble kun intereso ni aŭskultas pri Zamenhof de d-ro CHMIELIK kaj s-ro GACOND, kaj sabate pri arto, ktp. Dankon, tio estas agrablaj temp-etoj !"

Cl.- Rudolf KOPPEL en Ettlingen (Germanio okcidenta) skribis:

A.- "Mi persone ĝojus se vi estonte elsendus ankaŭ mallongajn informojn pri aktualizaĵoj el svisa politiko, kulturo, tekniko, naturprotektado. Do, mi preferus pli intervjuojn kun variaj homoj pri aktualaj temoj (poste esperantigitaj) kaj malpli historiaj temoj aŭ komentarioj pri alilandaj eventoj (escepte pri la esperantomovado). Estus certe bone por la prestiĝo de Svisa Radio Internacia se vi plilongigus viajn elsendojn - mi pensas pri 15 minutoj ĉiutage (vidu radiojn Pekin kaj Varsovio). Mi ŝatas la Svisan Radion Internacia kaj per tio ankaŭ la svisojn kaŭze de tio, ke vi havas la kuraĝon kaj komprenon por la internacia lingvo. Sen viaj esperanto-elsendoj vi certe ne estus tiel proksimaj al mi. Mia opinio estas negrava sed mi asertas, ke vi kontribuas per tio esence al monda kulturo." "Hodiaŭ vi vere ekinteresis min pri la "Literatura Foiro", tial mi petas specimenan ekzempleron de tiu revuo."

Cl.- Karel KRAFT en Borotice (Ĉeĥoslovakio) skribis:

A.- "Mi gratulas al vi pro via konstanta sindona laboro, kiu alportas kreskon de via aŭskultantaro. Mi tre dezirus, ke via redakcio ricevu eĉ pli da eĥoj kaj ke ĝi fariĝu egalvalora al la ceteraj ok nacilingvaj redakcioj. Al tio mi nun pli intence kontribuos ankaŭ kun miaj modestaj ebloj. Tio postulos de mi nur pli da pacienco ĉe la aparato."

Cl.- En alia letero Karel KRAFT diras:

A.- "Mi tre ĝojus, se vi povus ĉiam komence aŭ fine de la ĉefa programero enŝovi iujn detalojn pri la venontaj programoj. Tio povus kontribui al pli multa aŭskultiĝo, ĉar certe ofte okazas, ke vian programon hazarde aŭdas iu, kiu ne regule aŭskultas. Ekzemple mia amiko, kiu neniam aŭskultis vian stacion, kaptis ĝin hazarde je iu sabata posttagmezo kaj li diris ke se li estus aŭdinta adreson de la stacio kun alvoko alskribi, li certe estus farinta tion."

Cl.- Ni dankas pro la konsiloj kaj ni provos obei al ili. Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la salutadojn al la geaŭdantoj la venontajn semajnojn. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2012*